# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-30 n-ro 401


# Maroko: nova manifestacio en damaĝita eks-mina urbo



41 homoj mortigitaj en bombatakoj en Afgania ĉefurbo Kabulo

Parkumita aviadilo trafis konstruaĵon pro puŝo de la vento

Vintra promenado en Londono

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**

hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopiniaj kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Maroko: nova manifestacio en damaĝita eks-mina urbo
*La plej malriĉa urbo de la lando p. 03*

41 homoj mortigitaj en bombatakoj en aAfgania ĉefurbo Kabulo
*Kaj 84 aliaj vunditaj p. 04*

Parkumita aviadilo trafis konstruaĵon pro puŝo de la vento
*Internacia flughaveno de Malto p. 04*

Vintra promenado en Londono
*Emocie surpriziĝi pri la malkovroj p. 05*

Hodiaŭe
*Huberto ROHDEN; Rudyard KIPLING; Theodor FONTANE; kaj Birdo p. 06*

# Maroko: nova manifestacio en damaĝita eks-mina urbo

Miloj da personoj denove kolektiĝis merkrede [27 dec 2017] en *Jerada*, nord-oriente de Maroko, postulante «laboron kaj disvolviĝon», kelkajn tagojn post la morto de du fratoj en antracita kaŝminejo.



Kriante «Ekonomian alternativon!», aŭ «For la flankenigon!», la manifestaciantoj, plejparte junaj, amasiĝis sur la ĉefa placo de tiu eks-mina urbo por esprimi sian koleron post la morto de du fratoj.

Houcine kaj Jedouane, aĝaj respektive je 23 kaj 30 jaroj, mortis en akcidento, dum ili provis ekstrakti, sen ia ajn protekto, karbon en senfunkciigita minejo, kaŭzante indignon de la loĝantoj de tiu malriĉa municipo.

«Ni postulas de la ŝtato, ke ĝi trovu solvon al niaj problemoj, senlaboreco de la junuloj, tro kostaj fakturoj por la akvo kaj elektro», asertis Abdessamih, manifestacianto 23-jara, kiu preferis kaŝi sian familinomon.

«La junuloj, kiuj malsupreniras en la karbominputojn, riskas sian vivon, ĉar ili havas neniun alian vivrimedon. Ni postulas de la aŭtoritatoj, ke ĝi trovu por ni alternativon», li daŭrigis.

De post la fermo de la mino, kiu vivtenis *Jeradan*, «la urbo havas neniujn aliajn rimedojn. Tie ĉi estas nek laborpostenoj, nek uzinoj. La homoj vivas en malstabileco», laŭ loka respondeculo de la Maroka asocio pri la Homaj rajtoj (AMDH).

Multaj manifestaciantoj, kiuj svingis marokajn flagojn, akuzis la «altrangulojn» de la regiono, kiuj posedas ekspluatpermesilojn de karbo, kaj kiuj trudas sian volon.

Same kiel multaj aliaj manifestaciantoj, Hassan, studento 25-jara, kiu preferas kaŝi sian nomon, akuzas tiujn «altrangulojn», inter kiuj lokaj elektitoj, ke ili aĉetas karbon ekstraktitan de la kaŝlaboristoj je «bagatela prezo», kaj revendas ĝin je prezoj multe pli altaj.

La Maroka ministro pri energio kaj minoj, Aziz Rebbah asertis, ke lia ministrejo ne hezitos «nuligi iun ajn permesilon pri esploro aŭ ekspluatado, okaze de malobservado de la reglamento aŭ ekscesoj», en «*Jerada* aŭ aliloke». Li asertis, ke li jam «nuligis pli ol 1 400 permesilojn en 2017 en la tuta Reĝlando».

Malgraŭ la fermo, fine de la 1990-aj jaroj, de granda mino, kiu dungadis ĉirkaŭ 9 000 personojn, centoj da ministoj plu riskas sian vivon por ekstrakti karbon en kaŝminejoj.

Tiu aktiveco postlasis damaĝojn ĉe la ministoj, kies plimulto suferas pri silikozo, pulmo-malsano kaŭzita de inhalado de fajnaj karbo-polvoj.

Situanta apud la alĝeria landlimo, *Jerada* hodiaŭ estas unu el la plej malriĉaj urboj de la lando, laŭ oficialaj statistikoj.

Neniam Milito Inter Ni

# 41 homoj mortigitaj en bombatakoj en Afgania ĉefurbo Kabulo

La afganiaj aŭtoritatoj diris, ke 41 homoj estis mortigitaj kaj 84 aliaj vunditaj ĵaŭde [28 dec 2017], post kiam du sinmortigaj bombatakoj kaj eksplodo de alia bombo skuis kulturan centron en la okcidenta kvartalo de la Afgania ĉefurbo Kabulo.



Wahid MAJROH, proparolanto de la Afgania Ministerio pri Publika Sano, diris al raportistoj, ke inter la mortintoj en la ĵaŭdaj terorismaj atakoj estis kvar virinoj kaj du infanoj, kaj ok virinoj estis inter la vunditoj. La atako okazis matene. Teroristoj atakis la socian kaj kulturan centron *Tebyan* en la regiono *Dasht-i-Barchi*.

Kvin el la vunditoj estis en kriza stato kaj la plejparto de la vunditoj suferis gravajn brulvundojn. Kunveno okazis en la tri-etaĝa konstruaĵo antaŭ la eksplodoj en la dense loĝata regiono.


La terorisma grupo Islama Ŝtato deklaris respondecon pri la okazaĵo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Parkumita aviadilo trafis konstruaĵon pro puŝo de la vento

Merkrede, la 27-an de decembro, privata jetpasaĝeraviadilo, kiu estis parkumita, trafis malgrandan konstruaĵon post ĝi esti forpuŝita de la vento el la aviadilodromo de la internacia flughaveno de Malto (sudeŭropa insula ŝtato en Mediteraneo).




La novaĵagentejo *Reuters* informis, ke laŭ la lokaj amaskomunikiloj, oficistoj de la flughaveno supozas, ke tiu akcidento okazis pro puŝo fare de ekventego al la aviadilo, kiu rompis la kradon kaj koliziis.

Laŭ la gazeto "*Times of Malta*", la konstruaĵo apartenas al la firmao Polidano. "Ŝajne ventego kaŭzis tion. La konstruaĵo ne estis tiom difektita, sed la aviadilo jes", tion diris la proparolanto de la firmao, Jean Paul SAMMUT. Estis neniu en tiu loko je la momento de la kolizio.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Vintra promenado en Londono

Turismi helpe de gvidlibro ne tiom amuzas mian kunulinon kaj min. Ni preferas mem malkovri vidindaĵojn, historiajn aŭ modernajn lokojn kaj emocie surpriziĝi pri la malkovroj. Ni neniam faras liston de nepre vizitendaj lokoj, laŭopinie de gvidlibroj aŭ retejoj. Ni kvazaŭ petus de la nekonata ĉirkaŭaĵo surprizi nin!

Antaŭ preskaŭ 20 jaroj, dum vojaĝo al alia kontinento, unuafoje ni haltis en Londono dum malpli ol du tagoj. Laŭ la amasturismaj kriterioj, ni vizitis tie preskaŭ nenion sed la tiama tuttaga promenado restas ĝis nun la plej bela kaj vere neforgesebla de nia komuna vivo.

Komence de februaro kun terura vetero, ni eliris frumatene el la hotelo kaj mergiĝis en la fifaman londonan nebulon. Preskaŭ same nebula estis nia celo: *Greenwich* [grinviĉ] [ˈgrɛnɪtʃ, ˈgrɪnɪdʒ]. Tiu ĉi nomo elvokis en ni naivajn, junaĝajn fantaziojn kaj revojn. Ek do, al metroo por atingi Tamizon. En la enŝipiĝejo apud *Westminster*, ni tute solaj atendis la ŝipon. Malvarmega vento iom forpelis la nebulon kaj donis al ni espereton por pliboniĝonta vetero.

Atinginte la grinviĉan enŝipiĝejon, dum nin bonvenigis la fama muzea trimasta ŝipo "*Cutty Sark*" kaj la pompe majesta Reĝa Ŝipakademio, ekfalis pluveto. Ni daŭre estis la solaj, malprudentaj vizitantoj kaj trairis la korton de la vasta konstruaĵo, celante la fone videblan montenton de la famega observatorio, je distanco de pli-malpli unu kilometro.

Je la mezo de la vojo, subite eksplodis brita ŝtormo: niaj priridindaj ombreloj abrupte disrompiĝis kaj pluvego atakis niajn kapuĉojn kaj jakojn, ankaŭ ili vere mizeraj, se ne paroli pri niaj tute ne taŭgaj ŝuoj. Mallumo, ventego, malvarmo, pluvelverŝoj: ni vere sentis nin ŝippereuloj en ŝtorma, norda maro! Helpante unu al la alia por ne stumbli kaj droni, finfine ni alvenis al sekura haveno: la revata observatorio, bonŝance jam malfermita kaj bonege varmigita. Anhelantaj ni eniris, sidiĝis en la halo kaj formetis la gutegantajn jakojn sen rimarki eĉ unu solan gardiston. Tiel ni romantike brakumitaj pasigis longan tempon en la intime varma umbiliko de la eksa brita imperio, tute solaj: malfacile kredeble, se oni pensas pri la milionoj da turistoj, kiuj vizitadas ĝin.

En la mezo de la salonego etendiĝis ĝis la kupolo, la ligna, longa teleskopo. Scivoleme mi alproksimiĝis kaj rigardis tra la okulario kaj ekridegis, ĉar aperis tie ... la bildstria silueto de Miĉjo Muso: belege trafa ekzemplo de brita humuro!

Kiam la ŝtormo malproksimiĝis kaj la pluvo preskaŭ ĉesis, ni ne rezignis pri la tradicia foto rajde de la famega Grinviĉa Meridiano, markita en la observatoria korto. Ĉirilate, mi ne scias, kiam oni markis ĝin tie, sed kiel oni povas konstati el la supra ilustraĵo, la vera meridiano pasas kelkdekojn da metroj for de la observatorio. Nu, bone! Verŝajne trompeti turistojn estas firmiĝinta kutimo de ĉiuj imperioj.

Reveninte al la enŝipiĝejo ni rimarkis, ĉe la riverbordo, malgrandan kupolan konstruaĵon. Tiel ni malkovris la subtamizan piediran tunelon, tra kiu ni atingis la tiel nomatan "Insulon de hundoj". Dum la tuta tunela trairado ni renkontis nur viron kun hundo kaj granda fortika ombrelo. Sur tiu londona eksa insulo oni konstruis la novan financan centron "*Canary Warf*". Tiam ĝi estis konektita al la metroa reto per komence surfaca fervojo, tute aŭtomata, t.e. sen kondukisto aŭ alia servistaro. Por ni, provincanoj kutimiĝintaj al dezerta vivo, temis pri tikla surprizo uzi tiom novigan veturilon.

Tiel, tre kontentige, finiĝis nia neforgesebla, unua vizito en Londono.

Gian Piero Savio
Esperanta Retradio




## Huberto Rohden

**Huberto Rohden (Naskiĝis en la 30-a de decembro 1893 en *Tubarão*, Brazilo; mortis en la 7-a de oktobro 1981), estis diplomito pri scienco, filozofio kaj teologio en la universitatoj de *Innsbruck*, *Valkenburg* kaj Napolo kaj verkinto de multaj filozofiaj verkoj.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

## Rudyard Kipling



**Rudyard Kipling [REDjerd KIPling]** [ˈrʌdjərd kɪplɪŋ] **(naskiĝis la 30-an de decembro 1865 en Bombajo, Barato; mortis la 18-an de januaro 1936 en Londono) estis brita aŭtoro de poezio kaj prozo, gajninto de la Premio Nobel pri Literaturo en 1907.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**



## Theodor Fontane

**Theodor Fontane** [ˈtʰeːodoɐ̯ fɔnˈtaːnə]**, aŭ plennome: Henri Théodore Fontane (naskiĝis 30-a de decembro 1819 en *Neuruppin*, mortis 20-a de septembro 1898 en Berlino) estis germana verkisto de hugenota deveno.**

**En Esperanto aperis: *John Maynard; Sub la pirarbo*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

***Gracupica contra*, Barato.**

**Vikipedio**